Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio**

# La Kolombo de Paco

**10-a de julio 2021, numero 5**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La unua tutmonda enreta Esperanto-Kvizo alvenas!

Ĉu vi pensas ke vi jam scias multon pri Esperanto? Ĉu ne nur la lingvon mem vi bone regas, sed ankaŭ vi havas detalajn sciojn pri ties movado, historio kaj kulturo? Tiukaze nia "Esperanto-Kvizo" estas ĉi tie ĝuste por vi!

UEA lanĉas en tiu ĉi daŭre malfacila tempo de limigoj de personaj kontakto, tutmondan enretan kvizon, kies celoj estas samtempe edukaj kaj amuzigaj. La kvizo volas parte instrui al vi – proponi eblajn novajn, utilajn informojn pri Esperanto kiel tutmonda fenomeno, kun sia riĉa historio kaj agadoj. Aliflanke la kvizo estas amuziga aktivaĵo – dum kiu vi povas testi vin mem, por ekscii, kiujn sciojn vi ja jam havas kaj kiujn ankoraŭ indas plibonigi.



En unu kvizo troviĝos ĉiam 12 demandoj, el 12 kategorioj (po unu de ĉiu), por ĉiu respondo estas maksimume 20 sekundoj. Ĉiu demando havas nur unu ĝustan respondon. La poentoj kalkuliĝas kaj por la ĝustaj respondoj, kaj por la rapideco de la respondoj.

Nu kaj por ke la kvizo estu eĉ pli alloga, UEA, kune kun pluraj sponsoroj, pretigis por vi diversajn valorajn Esperanto-premiojn! La kvizo do ne nur povas helpi al vi ekscii novaĵojn pri nia komunumo, aŭ testi vin, kion ĉion vi jam scias, sed aldone ebligas al ĉiu gajni!

La kvizo estos lanĉita okaze de la unua tago de la 2-a VK (Virtuala kongreso), la 17-an de julio kaj daŭros ĝis la 31-a de aŭgusto 2021.

UEA kune kun la krea teamo de E@I deziras al vi ĉiuj multan sukceson! Havu multajn ĝustajn respondojn kaj fulmrapidajn fingrojn!

Se vi scivolemas pri la kvizo, volus kontakti nin pro ajna kialo, volonte skribu al *info@kvizo.esperanto.net*.

Pli da informo:
https://kvizo.esperanto.net

**Organizanto de la kvizo**

**Partnero de la kvizo**

**Sponsoroj**

# Mondovizio: talento-konkurso dum la 2-a Virtuala Kongreso

Kunhavigu vian talenton kun homoj el la tuta mondo! Okazinta la unuan fojon dum la reta IJK de 2020, la konkurso Mondovizio, kun siaj belegaj kaj ĉarmaj prezentantoj, revenos por la 2-a Virtuala Kongreso! Ĉi tiu 'juvelo en la krono' de la junulara programo de VK aspektas kiel tradicia internacia vespero, sed estas pli moderna, pli internacia kaj pli konkurenca ol vi imagas! Ĉu pere de kanto, laŭtlegata poemo, teatraĵo aŭ eĉ montrado de mankreaĵo – ni volas viajn talentajn kontribuojn kaj bonvenigas ĉiun! Kaj plej grave, la plej bonaj kontribuoj ricevos misterajn ekskluzivajn premiojn! Nepre sendu vian kontribuon per WeTransfer al *jupo@vk.esperanto.net* antaŭ la 21-a de Julio. Ariel Bonkorpa, Siru Laine kaj Tyron Surmon prezentos! Manuela Burghelea ĉefgvidas la junularan programon (JuPo) de VK!




Ĉu vi volas subteni TEJO-n? Fariĝu Patrono!
https://uea.org/alighoj/alighilo

Vi povas esti aŭtoro
de la *Kolombo de Paco*
kaj la Reta Revuo! Por kontribui,
skribu al la redakcio
*redakcio@revuoesperanto.org*

# Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2021–2022)

Kadre de la Eŭropaj Solidaraj Korpusoj (antaŭe Eŭropa Volontula Servo) TEJO invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de la organizo, sed estas samtempe persona pliriĉiĝo. La volontulo laboras en la koro de la Esperanto-movado.




ESK estas malferma al junaj kandidatoj kies aĝo estas inter 18 kaj 30 jaroj. La projekto limigas la daŭron de la volontulado al maksimume unu jaro, tiel ebligante al multaj akiri tiujn spertojn. Kiel volontulo vi certe lernos memstare labori kaj povos profundigi viajn spertoj. Pliaj informoj: https://www.tejo.org/esc2021/



# La rejunigo de Eŭropo – AMO bezonata

Stefan MacGill




Aktivula Maturigo - Virtuala

Jen la esenca temo de la 74-a Seminario pri Aktivula Maturigo. Tio okazos en ĵaŭdo, la 22-a de julio. Abundas la pruvoj pri la netrakteblo de ĉi tiu temo. Provis AMO 24, 69, 72 kaj tuje AMO 74 kaj 77. Tamen, la ciferoj montras obstine la skalon de la problemo. Laŭ ĵusa analizo de la CO, jen la proporcioj de junuloj (ĝis-35-jaraj) en elektitaj landoj por jarkotizantoj: Kongo DR 55 %, Benino 39, Vjetnamio 30, Brazilo 24, Svislando 19, Meksiko 18, Rusio 15, Ĉinio 14, Usono 14, Kanado 12, Pollando 11, Hispanio 11, Nederlando 11, Italio 9, Francio 8, Germanio 7, Danlando 6, Koreio 6, Finnlando 5, Japanio 3.

Ĝojinda estas la kreskanta nombro de junuloj ekster Eŭropo, sed la aĝiĝo de nia komunumo la lulila kontinento de Esperanto devas esti maltrankviliga. La averaĝa aĝo de eŭropanoj estas ĉ. 40-jara – kontraste por nia eŭropa esperantista komunumo de ie inter 60 kaj 65-jara.

Feliĉe, nia seminario estos inaŭgurita per prezentaĵo de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kiu delonge interesiĝas pri la temo. Ni plie esperas aŭdi spertojn el Latin-Ameriko, kie la lingvokurso lanĉita en 2020 kaj ripetita en 2021 ne nur signife revivigis la membraron de UEA tra la kontinento, ĝi krome rimarkeble junigis ĝin. Ja Latinameriko estas preskaŭ dulingva, kontraste Eŭropo estas multlingva. Tamen, ni havas amason da lingvokursoj en vasta gamo da eŭropaj lingvoj. Ĉu ne eblas mobilizi tiujn por krei similan rezulton?

Ni konfesas, ke la kontribuemo de homoj al la AMO-seminario 74 tre modestas. Eble la temo estas tro timiga. Ni vokas al aktivuloj kaj niaj fakaj asocioj: anoncu vin! TEJO bedaŭrinde decidis ne kontribui kaj sendis detalan motivaron por tiu nepartopreno. Aliaj kontaktitoj ne estas alireblaj en tiu dato pro feriaj forestoj. Do, aliaj, anoncu vin al la aŭtoro.

https://www.facebook.com/esperantorevuo

**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**

https://twitter.com/revuo_esperanto

# Kampanjo por konvinki Uneskon deklari la "Internacian Tagon de Esperanto"

La komunumo de #Esperanto delonge agnokis la 26-an de julio kiel la Tagon de Esperanto. Ĉu nun alvenis la vico de Unesko tion fari? Informiĝu pri la kampanjo de UEA ĉe uea.org/gk/964 kaj aliĝu al la 2-a Virtuala Kongreso ĉe vk.esperanto.net por spekti la analizan prelegon de s-ro Trezoro Huang Yinbao, la 2-a Vicprezidanto de UEA, respondeca pri la agadoj ĉe Unesko.




# La Budhana Kunsido

La Budhana Kunsido okazos kadre de la 2-a Virtuala Kongreso de #Esperanto (vk.esperanto.net). Honora membro de UEA, So Gilsu kaj kolegoj Yamaguti Sin'iti kaj Bill Mak gvidos. La kunsido invitas ankaŭ ne-budhanojn, kiuj interesiĝas pri budhismo. En la kunsido estos 3 prelegoj, i.a. pri budhanaj tradicioj kaj budhana kunlaboro por pli paca mondo. Aliĝu al la VK: https://vk.esperanto.net – Paco kaj konfido: universalaj valoroj.



# Kolektaĵoj plu vivigas

Kolektaĵoj plu vivigas: Rodo, Larose kaj Hechtl, tri fruaj esperantistoj kaj iliaj kulturaj agadoj. Kadre de la 2-a Virtuala Kongreso de #Esperanto (vk.esperanto.net) prelegos Elda Doerfler kaj James Rezende Piton reprezente de ELF/AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj). La prelego atentigos, ke danke al serioza esplorado pri nia Esperanto-historio eblas konatiĝi kun homoj, kiuj havis dum sia vivo ekster Esperantujo elstarajn rolojn – precipe en la artisma medio, ĉu nacia, ĉu internacia – sed samtempe kapablis lasi gravajn spurojn ankaŭ al la esperantistaro.




# Je la rando de (mal)konfido

Je la rando de (mal)konfido: Esperanto tra la kribriloj de poŝta cenzuro – spektu dum la 2-a Virtuala Kongreso (https://vk.esperanto.net) la prelegon de James Rezende Piton kadre de la kongresa temo "Paco kaj konfido: universalaj valoroj". Dum militoj aŭ aŭtoritatecaj reĝimoj en la 20-a jarcento instaliĝis poŝta cenzuro, kun la celo kontroli kaj eventuale forbari informfluon. Cenzuristoj nepre devis scipovi la lingvon de la poŝtaĵoj por plenumi la filtradon. En tiu ĉi prezentaĵo oni montros per filatelaj dokumentoj iom pri okazoj de poŝta cenzuro. Oni konstatos, ke ankaŭ korespondaĵoj en Esperanto en tre diversaj epokoj kaj landoj estis pritraktitaj (kaj plejofte allasitaj) de cenzuristoj. Tiuj esploroj okazas kadre de ELF/AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj), kiu ankaŭ prezentiĝos dum la 2-a Virtuala Movada Foiro.




# Internacia Ret-seminario pri "Esperanto kaj Interkultura Komunikado"

La Universitato de Ŝirazo, kun helpo de UEA kaj kadre de IKIKO (Internacia Kongreso pri Intekultura Komunikado) okazigas Internacian Ret-seminarion pri "Esperanto kaj Interkultura Komunikado"

Tio estas serio de la pregeloj de profesoroj en Esperanto kun sinsekvaj interpretadoj en la persan.

Ĝi okazas inter la 9-a kaj 11-a de julio 2021 kaj estas spektebla ĉe UEAViva:
https://www.youtube.com/UEAviva

Pliajn detalojn trovu ĉe Eventa Servo:
https://eventaservo.org/e/51272c

